

Kulturaj Kajeroj

E.MAME

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 60 fkoj

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1984 - 4

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la Mondo

La hind-eŭropaj lingvoj (1) D. Moirand

La aventuroj de Fifi Stultul Mik

Niaj literaturaj trezoroj J.-P. Danvy

La faŭno de l'pratempo (1) R. Röllinger

Paĝo de la geknaboj B. Potts

Fantaziaĵo : Enamiĝinta I. Nagy

Por via distro C. Cavalié

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras, ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

KULTURAJ ARANĜOJ 1985

PRINTEMPO

Internacia Renkonto de Infanoj

alveno dimanĉon 31-an de marto- foriro sabaton 6-an de aprilo
— kursoj, redaktado de staĝ-gazeto, distraĵoj
— diskutrondo pri lingvo-instruado kaj enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Neformala Internacia Renkonto

alveno dimanĉon 16-an de junio- foriro dimanĉon 30-an
— La programo estos fiksita surloke laŭ la deziroj de la ĉeestantoj. Ebleco ĉeesti kursojn, konversaciajn rondojn, promenadojn, ekskursojn aŭ... nuran ripozon.

SOMERO

PRELEGOJ kaj KURSOJ

alveno dimanĉon 30-an de junio- foriro 21-an de julio
— prelegoj diverstemaj — konversacioj
— seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto
— kursoj diversnivelaj por internacia lernantaro
— malkovro de la regiono

KURSOJ

alveno lundon 22-an de julio — foriro dimanĉon 11-an de aŭgusto
— kursoj diversnivelaj por internacia lernantaro
— konversacioj, teatro, artlaboroj
— malkovro de la regiono.

KURSOJ - INFORMATIKO por kaj per ESPERANTO

alveno dimanĉon 11-an — foriro 1-an de septembro
— kursoj trinivelaj dum la tuta periodo
— malkovro de la regiono
— De la 11/8 ĝis la 24/8 (unuaj du semajnoj)

INFORMATIKO per kaj por ESPERANTO
inicado kaj praktikado

— De la 18/8 ĝis la 1/9 (lastaj du semajnoj)

RENKONTO de BLINDAJ kaj NE-BLINDAJ ESPERANTISTOJ
organizita de FUBE

Komunaj kulturaj aranĝoj
Trejnado al trakudo (gvid. R. Gonin)

KULTURAJ KAJEROJ deziras al siaj legantoj kaj amikoj feliĉon kaj sanon dum la tuta venonta jaro.

Esperanto tra la Mondo

DE LA UNIVERSALA KONGRESO EN VANKUVERO...

— 802 homoj el 46 landoj aliĝis al la U.K. en Vankuvero, Kanado (21-28/7), inter ili 200 el la proksima Usono. La diversaj eroj bone sukcesis kaj la komitato de UEA vigle laboris. La estraro decidis organizi la UK 1986 en Pekino, kaj la komitato deziras, ke Varsovio estu elektita por la UK de la centa datreveno en 1987. Ĝi krome esprimis la opinion, ke estus bone aranĝi UK en Afriko, ekz. en 1990.

— La fina rezolucio rekomendas, ke la ŝtatoj kaj internaciaj instancoj, la edukaj instancoj, « ekzamenu la potencialon kaj perspektivojn de Esperanto kiel lingvo por internacia uzado kaj por la demokratiigo de lingvouzo en internaciaj rilatoj ».

AL TIU EN AŬGSBURGO :

— Ĝi okazos de la 3-a ĝis la 10-a de aŭg. 1985. Aŭgsburgo festos la 2000-jaran jubileon de sia fondiĝo en la romia epoko. Sekve, la kongresa temo estos : « Antikvo kaj moderno : kion ŝanĝi, kion konservi ? » De nun, la LKK, Seitzstr. 14, D-8900 Aŭgsburgo, povas liveri al la Esperanto-grupoj prospekton en Esp. pri Germanujo, pri Aŭgsburgo, la unuan bultenon, kaj ĝi disponas pri duonhora kolora esperantlingva filmo.

— Oni antaŭvidas du antaŭkongresojn : Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj en Aŭgsburgo. Inf. : T. Speckmann, Trierestr. 45, D-5000 Köln 1 (27/7-2/8) kaj samdate Ekumena Kongreso en Aŭgsburgo. Inf. : P. A. Burkhardt, Untere Str. 39, D-7311 Bissingen/Teck. Tuj post la UK (11-18/8), postkongreso kun interesa programo en Kronach, kun fakultativa vizito al GDR. Inf. : Städtisches Fremdenverkehrsamt, Postfach 510, D-8640 Kronach.

41-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO :

En Eringerfeld (FRG) 22-29/7/1985) kun ĉeftemo ligita kun la Internacia Jaro de la Junularo. Inf. : GEF, Postfach 1 I 1422, D-2000 Hamburg.

SAT-KONGRESO :

Ĝi okazis en Artigues, apud Bordeaux (1-8/8). Partoprenis 260 homoj el dudeko da landoj. Du renkontiĝoj okazis en la antaŭa semajno : junulara en Villandraut kaj antaŭkongreso en Pau. La kongresa programo estis tre riĉa, kultura kaj distra. Oni inaŭguris Esperantostraton en la najbara urbo Lormont. La kongreso 1985 okazos en Amersfoort, Nederlando (27/7-3/8).

USONA TELEVIDFILMO PRI ESPERANTO :

La partoprenantoj de la ĉijaraj aranĝoj en Usono povis spekti 30-minutan televidan filmon pri la Lingvo Internacia. Ĝi kostis 14000 dolarojn kaj oni proponos ĝin al televidaj stacioj en Usono. En la programo ĉefrolas la konata usona prezentisto Steve Allen.

NOVA REVUO PRI KOMERCO :

Aperis numero 1 de nova revuo en Esperanto « Internacia Revuo pri Ekonomio kaj Komerco ». 30-paĝa. Formato 21 × 27,9. Jarabono por 4 numeroj : 10 dolaroj. Eldonas : Interfakto, POB 42205, Washington, DC 20015 Usono.

FOIRA RENDEVUO :

8-10/3/1985, en Leipzig (GDR), Internacia Foira Esperanto Renkontiĝo. Inf. : IFER, K. Kollwitzstr. 115, DDR-7010 Leipzig.

INTERKIBERNETIK' 85 :

Sub tiu nomo, la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko, Sistemiko okazigos sian unuan mondkongreson en Budapeŝto, ĵus antaŭ la UK en Aŭgsburgo. Inf. : NJSZT-INTERKIBERNETIK, pf. 240, H-1368 Budapest.

FRANCAJ KONGRESOJ 1985 :

Kongreso de « Union Française pour l'Esperanto » (UFE) je Pasko (5-9/4) en Angers.

— Samdate, kongreso de SAT-Amikaro en Saint-Nazaire.

— Kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio (FKEA) en St-Etienne (14-17/6).

NOVE APERIS :

« Revenas mi », kasedo, kun teksto, de la kanzonisto Jak Le Puil.

— « Esperanta Antologio : poemoj 1887-1981 ». Dua eldono reviziita kaj kompletigita sub la redakto de W. Auld. 850 poemoj de 163 poetoj, en preskaŭ 900-paĝa volumo, kun ampleksa postparolo kaj 36 paĝoj da biografioj. Nº 1 de la jubilea kolekto de la jarcento de Esperanto.

— « Faktoj kaj fantazioj », legolibro por progresantoj de M. Boulton. 432 paĝoj.

— Krom la monata gazeto « El popola Ĉinio », aperas nun esperanta eldono de « Ĉinio en bildoj », fare de la Esperanto-sekcio de Guoji Shudian p.o. kesto 313, Beijing.

PROGRAMO 1985 DE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA :

Petu ĝin de Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds Svislando.

FINJARA SEMINARIO EN GERMANUJO :

Por gejunuloj kaj mezaĝuloj en Wetzar, pri la temo « Japanujo » (27/12-5/1). Inf. : E. Kuhl-Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen I FRG.

INSTRUISTOJ :

Jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj (Freinet-pedagogio) en Škofja-Loka (Jugosl.) (10-20/7). Inf. : P. Poisson 239, rue V.-Hugo, 37450 Saint-Cyr-sur-Loire. Francujo.

La Hind-Eùropaj Lingvoj (1)

La esperantistaro kutime ne multon konas pri la lingva situacio en la mondo. Tion oni povas facile kompreni, ĉar Esperanto estis kreita por forigi la lingvan ĥaoson. Ĝi estas tutmonda kaj, pro ĝia rolo de pontlingvo, oni kvazaŭ forgesas la ekziston de la aliaj, etnaj lingvoj.

Tamen, Zamenhof mem diris, ke ĉiu homo devas koni du lingvojn : la sian kaj ankaŭ Esperanton. Tio signifas, ke fakte la etnaj lingvoj tute normale pluvivas — feliĉe — sian vivon en nia mondo.

Se oni bone pristudas diversajn lingvojn kaj komparas ilin, oni konstatas, ke ili povas aperigi similajn aŭ malsimilajn trajtojn inter si. Sin bazante sur tiu simileco aŭ malsimileco, specialistoj povas konkludi, ke tiuj lingvoj estas parencaj aŭ ne.

Ni mem Francoj spertas tiun similecon, kiam ni aŭdas, ekzemple, la okcitanan lingvon, aŭ la italan, aŭ la hispanan. Instinkte ni komprenas parton de la diraĵo aŭ intuicie divenas tion, kion ni ne rekte komprenas. Ni do diras, ke la tri menciitaj lingvoj estas proksimaj al la franca. Specialisto en tiu ĉi kazo diras, ke la kvar lingvoj apartenas al la sama **lingva familio.**

Kio do estas familio, kiam tiu termino rilatas al lingvoj ?

Familio estas grupo da lingvoj, kiuj staras proksime unu al la aliaj (ne devige en la geografia senco). Ili prezentas similecon en kvar precizaj kampoj : **fonetiko** (regulaj korespondoj), **morfologio** (aŭ gramatiko), **sintakso** (tio estas en la maniero interrilatigi la vortojn inter ili por formi frazojn kaj en la maniero konstrui la frazojn), kaj **vortaro** (similaj vortoj kun similaj aŭ proksimaj signifoj).

Tiu parenceco povas esti pli aŭ malpli okulfrapa. Ni ja bone scias, ke la provenca lingvo estas pli « proksima » al la franca ol la hispana. Tio signifas, ke se ni volas lerni tiujn lingvojn, ni pli facile kaj rapide atingos rezultojn per la provenca ol per la hispana. Tial ni povas aldoni novan trajton en la nocio de lingva familio : la **proksimecon.**

Efektive, ni povas diri, ke ne ĉiuj diversaj parencaj lingvoj troviĝas sur la sama nivelo de proksimeco. Ekzemple, ni ĵus vidis, ke la okcitana lingvo estas tre proksima al la franca, male, la hispana aŭ la itala estas pli malproksimaj. Sed la hispana kaj la portugala lingvoj estas tute proksimaj inter si. Ankaŭ la rumana lingvo estas parenca al la franca, tamen ĝi rilatas al ĝi tiel malproksime kiel al la hispana aŭ itala. En tiu ĉi kazo, ni diros, ke la rumana lingvo staras izolita en la familio de la romidaj aŭ latinidaj lingvoj.

Nova scienco provis matematikigi la proksimecon de la lingvoj inter si : la lingva statistiko aŭ glotokronologio. Specialistoj elektis serion de bazaj vortoj, kiuj nepre ekzistas en ĉiu lingvo kaj civilizo (mano, piedo kapo... manĝi, trinki, dormi... mia, via...) kaj uzante relative simplan matematikan formulon :

$$d = \frac{\log c}{2 \log r}$$

oni povas scii ekde kiom da jaroj (en la formulo : d) du lingvoj komencis apartiĝi unu de la alia. Ni povas diri, ke glotokronologio estas por la lingvistoj, kiel karbono 14 por la arkeologoj.

Tiu koncepto pri proksimeco ebligas dividi iun ajn lingvan familion en subfamiliojn, nomitajn « **brancoj** ». Do oni nomas « branĉo de lingvoj » aron da lingvoj, kiuj pli proksime rilatas inter si ol kun iu ajn alia membro de la familio.

Sed oni povas demandi sin, kiel klariĝas la rilatoj aŭ la komunaj trajtoj, kiujn oni konstatas inter la lingvoj. Kiel lingvoj povas esti parencaj ?

Kiam oni parolas pri familio aŭ pri parenceco, oni kutime aludas al la homoj : patro generas idon, kiu siavice generas novan idaron ktp. Tiu ĉi bildo validas ankaŭ por la lingvoj. Ekzemple, la latina lingvo, kiu ekzistis sur la teritorio de la nuna centra Italio antaŭ 2500 jaroj, tute ne ĉesis vivi : ĝi nur transformiĝis pro la fluado de la tempo kaj pro la loko, kie ĝi estis parolata : ĉu proksime al Romo sur sia natura areo, ĉu malproksime, adoptita de fremdaj triboj. Tiuj kaŭzoj agis sur la lingvo kaj, iom post iom, ĝi forlasis sian primitivan karakteron, transformiĝis, akiris novajn karakterizaĵojn kaj kutimojn kaj finfine ĝi branĉiĝis en tute apartigitajn lingvojn, facile distingeblajn sed ne plu kompreneblajn inter si. Tial unu lingvo naskis plurajn lingvojn-idojn : oni diras, ke la latina lingvo naskis la latinidajn (aŭ romidajn) lingvojn. Tiu nasko do estas nura fakto de disvolviĝado. Kiam « naskiĝas » lingvo-ido, la patra lingvo mortas. La patro kaj la filo ne povas samtempe kunvivi : unu estas ekskluziva de la alia. Do la termino : naski/naskiĝi estas malĝusta, sed la tradicio enradikigis ĝin.

Ni do vidis, ke nia franca lingvo senpere devenas de la disvolviĝo de la latina lingvo, sed tiu latina lingvo mem ne aperis subite sur la itala tereno kaj ni rajtas demandi nin : « Ĉu la latina lingvo siavice ne estis ido de alia pra-

lingvo ? » kaj denove demandi la samon pri la patrina lingvo de la latina... Fine, ĉu ni ne povus atingi de ŝtupo al ŝtupo la lastan ŝtupon, kiu estus la prapatra lingvo, el kiu devenus ĉiuj lingvoj en nia mondo ?

Tiun lastan ŝtupon oni ne atingis, ĉar la donitaĵoj de la modernaj lingvoj ne ebligas rekonstrui ĝin kvankam ni rajtas postulati ĝin. Eĉ la specialistoj ankoraŭ ne atingis tiun lastan (komunan) gradon, ili tamen faris multon sur la kampo de la **kompara** lingvistiko por la hindeŭropaj lingvoj.

Tiu ĉi fako de la lingvistiko naskiĝis antaŭ pli ol cent jaroj en Germanujo, kiam lingvistoj notis la similaĵojn inter la tri klasikaj lingvoj (latina, greka, sanskrita — en Hindio) kaj la germana.

La pioniroj de la kompara lingvistiko nombras tri :

Franz Bopp, Jakob Grimm kaj Rasmus Rask.

Franz Bopp : naskiĝis en Mainz en 1791, mortis en Berlino en 1867. Li estis profesoro pri filologio kaj sanskrita lingvo en la berlina universitato. Li verkis plurajn librojn pri la verba sistemo en la sanskrita, greka, latina, irana kaj germana lingvoj. Sed lia ĉefverko estas « Kompara gramatiko de la sanskrita, zenda, greka, latina, litva, malnovslava, gota kaj germana lingvoj » (1833-52). La franco Michel Bréal tradukis tiun verkon franclingven (1866).

Jacob Grimm : naskiĝis en Hanau (1785), mortis en Berlino (1863). Li unue studis juron en Marburgo kaj Parizo. Poste li iĝis bibliotekisto en Kassel kaj profesoro en Götingen. Li membriĝas en la Scienca Akademio (Berlino 1841). Li estas la vera fondinto de la germana filologio, sed eble li estas pli konata pro sia kunlaboro kun la frato pri la popolaj rakontoj por la infanoj.

Rasmus Christian Rask (1787-1832). Dana lingvisto. Post granda vojaĝo tra Svedujo, Norvegujo kaj Islando, li publikigas libron pri « la originoj de la islanda lingvo » (1818). Poste li veturas ĝis Hindio kaj revenas kun abundo da iranaj budhismaj manuskriptoj. Samtempe kun Bopp (sed tute aparte) li agnoskis la parencecon de la germanaj lingvoj kun la greka, latina kaj balto-slavaj lingvoj.

(Daŭrigota)

D. MOIRAND

LA AVENTUROJ DE FIFI STULTUL



PRI NIAJ LITERATURAJ TREZOROJ

patr'onia

Kiam (vd KK-jn 84/2) direktoro de aliĝenra gazeto kontaktis min por partopreni rubrikon pri « malnovaj verkistoj », mi ne malkonsentis, sed neaparte entuziasmiĝis. Ĉu ekzistas (aŭ devus ekzisti ?) ia « literatura instruado » pri esperantaj verkoj ? Feliĉe ne, mi volonte respondus : nur ekzistu katalogoj (kie ĉiu ĉerpu laŭ siaj emoj) kaj (eĉ se tiam mi devas partopreni !) artikoloj, per kiuj beotoj iom ligu aŭtoron kun alia, fluon kun serio, movadon kun eldonisto.

Sed ve ! En ĉi tiu libra abundo, per kiuj volumoj komenci ?... Nu... Se Sinjor' Direktor' pigras, kial mi ne lozu ?

Oni kromnomis Antonon Grabowski la patro de la esperanta poezio. Sed, ŝajne, la petolaj gefiloj avare dankis sian generinton. Freŝbakitaj esperantistoj senkompate verkas siajn nurajn poeziaĵojn post la tria leciono (teorio konata) kaj poste lasas fakulojn volapuki per ĵargono nekutima kadre de paĝoplenigaj alibioj. Estas konate, ke partenogenezo ne bezonas patron...

Kaj tamen... Se oni (ĉiam oni...) estus leginta pli detale la verkojn de A.G., kiom da latentaĵoj oni (!) estus pli rapide ekspluatintaj !... Kvankam historiistoj senĉese tion rediras, ŝajnas, ke la mesaĝo ne atingas la amasojn... Ĉu « oni » kulpas ?

Ni seriozu : Antono Grabowski (1857-1921) pli malpli regis 30 lingvojn, inter kiuj volapukon, sed transiris esperanten en jaro 87, kaj krom iom da reformemo (ĝis 94), li provis kiel eble plej uzi la lingvon, verkinte originale kaj traduke (krom vortaraj kaj asociaj zorgoj). Li iom « verdumis » (neniu estas perfekta !), kaj kelkaj ankoraŭ konas lian poemon « Tagiĝo » :

Agordu la brustojn, ho nia fratar'
Por nova, pli vigla jam kanto !
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto :

Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras en mond' !

Literature, li ankaŭ bataletis por defendo [de l'rimo :

Senrima kanto estas por mi
Flor' sekigita, sen odor',
Aŭtun-arbar' iĝanta dormi.
La muzikistoj flugis for.
(Sur unu kordo)

Sed plej menciindas, ke, kadre de siaj tradukaĵoj, li eksperimentis plurajn interesajn aferojn (ĉefe kadre de « El parnaso de popoloj » 1913), kiujn oni (ĉiam !) ne evidente priatentis. Jen kelkaj el ili :

— traduko de la franca aleksandro per sesjambo vire hemistika :

Naskiĝi kun printemp' kaj morti kun la [rozo,
Naĝadi kun zefir' en la ĉielo pura ;
Sur florburĝono sin balanci por ripozo,
Ebrie de l'arom', de lum', aer' lazura.
(Lamartine)

— anonco de la aŭldaj proponoj pri plurpiedaj versoj. Jen mirinda diagramo :

(ê)- /(ê)- /(ê)-

(skemo de la traduko de « Printempa kanto » el la bohema)

— fine, mi deziras emfazi, ke li tradukis siajn samtempulojn. Ekzemple, tiun nekredeblan Sully-Prudhomme, kiun nun (feliĉe !) nur atentaj legantoj de « Lucky Luke » konas :

La vazon, kie mortas la verben',
Per ventumilo ies man' ekfendis ;
La bat' apenaŭ tuŝis ĝin, ĉar jen
Nenia bru' resone sin etendis.

Se pri tiu kutimo traduki samtempulojn, [oni...

Ankaŭ rimarkinda estas lia strebo traduki kantojn. Ni menciu ĉefe la tradukon de la opero « Halka » (teksto W. Wolski, muziko S. Moniuszko). Jen vojo kiun oni (ja !) evidente malabunde poste esploris.

Jen eltiraĵo de la akto unua, sceno 3, « Terceto ». Ĉiuj tri rolantoj kantas samtempe (kio ne estas tre tre bona por la kompreno) :

Januŝ

Mia kara fianĉino !
Tiu kanto al ni diras :
Ĝoje tremas nia sino,
Tie brust' malgaje spiras !
Sonas plenda ĝem',
Mi rigardos mem !

Zofja

Kiel ĝoje tremas sino !
Kaj mi kore lin admiras !
Al mizero de virino
Doni helpon li deziras !
Sonas plenda ĝem'
Do li iras mem !

Stolnik

Malmodesta la virino !
Sed ĉagrene kanto spiras...
Doni helpon ni deziras.
Ĝoje tremas nia sino,
Tie sonas ĝem' !
Vi rigardu mem !

Sed ja oni (mi hatas onin !) daŭre plej emfazas lian dummilitan tradukon de « Sinjoro Tadeo » de A. Mickiewicz (8778 versoj !). (Parenteze, mi rimarkigu, ke iom perdiĝis el la spirito de la pioniroj. Malmultaj nun kuraĝas fronti longajn verkojn, kaj poemoj tre mallongas. Ĉu epoka ?) Grabowski uzas t.n. « polajn aleksandrojn », versojn, kiuj verŝajne havas pli grandajn meritojn ol oni (spit' !) suspektas. Mi ne vetus, ke tiu formo ne estu la « komedia aleksandro » por traduki ekzemple la teatraĵojn de Moljer, la esperanta aleksandro estante evidente tro pompa, kaj la kvaramfibrako tro laciga grandkvante (interesitoj legu ekz-e « La lajo de Ignore » en la Kromkancerkliniko n° 2).

Lingvaj eltrovoj abundas (209 neologismoj laŭ iuj studoj ; sed multaj fariĝis kutimaj). Se kelkaj proponoj ne enradikiĝis (ekzemple'as, kelk, presk, anstat'), kelkaj aliaj fariĝis relative oftaj (ĉi anstataŭ ĉi tiu, verbigo de participoj,



Statuo de Muckiewicz en Parizo.

kiel etenditas, Laŭdatu Jesu-Kristo), kaj pri kelkaj ceteraj mi ja legis denovajn prezentojn sub plumoj niaepokaj (ekzemple fungoj estis abunde, unujn, ambaŭn).

Mi kompreneble ne sukcesos rezisti antaŭ citemo de apartaj brilaj redonoj (respondecas A. Mickiewicz !).

Kaj kion franc' elpensas, tion polo ŝatas.
(I-480)

Mi loĝis palaceton tian, ĉerivere,
De l'urbo nek tro fore, nek ĉe l'urb' senpere.
(II-602/3)

Ĉar Polujon mutigi estas ĝin mortigi.
(V-436)

Rusoj diras : por preno donis manojn Dio.
(IX-131)

Ni tamen rimarku, ke la « progreso » iom relativigas ĉion ĉi. Ekzemple, Mickiewicz deklaris en la epilogo :

Kaj kion mi, sur Pariza pavimo, meditas,
Kiam mi la bruegon de l'urbo evitas ?

Nu... Kiuj sukcesis vidi lian statuon (far Bourdelle) inter du « rapidvojoj », tiuj dubas pri l'bruevito, kaj sekve pri la praveco de Mickiewicz...

Necesas konkludi... Ne ĉiuj forgesis Grabowskin. Almenaŭ kelkaj fantazias pri lia forpaso... Sed ĉu « oni » tion scias ?

Revenis post la milito al Varsovio,
neniam plu revidis la familion,
Konsolis sin tradukante nacian eposon.

Kaj mortis, verŝajne, antaŭ vitrino libreja.
(La Infana Raso ĉ.16, v. 16-19)

Oni eĉ pri tio apenaŭ scias... Ja, « oni » [lozas...
Mi ne solas, Sinjor' Direktor' !

Jopetro Danvy.

La faŭno de l'pratempo

EVOLUO DE LA VIVO DE LA FLAGELULOJ AL LA GIGANTAJ SAŬROJ.

En « Kastelo Grésillon » dum la « Kultura Periodo » en julio 1984, S-ro Hugo Röllinger ; FRG, prelegis en 2 tagoj, pere de 160 diapozitivoj, pri tiu ekster-ordinare interesa, scienca temo, kaptante la spektintojn per populareca lingvaĵo kaj per simpligita kronologieco en la prezentado. Pro nia invito, S-ro Röllinger disponigis al ni por la « Kulturaj Kajeroj » mallongigitan eltiraĵon pri sia prelego, adaptitan por preso sen siaj « vivigaj » diapozitivoj.

La homo ne estus homo, se ĝi ne povus konatiĝi kun la pra-epoko de sia terglobo, se ĝi ne klopodus esplori la transformiĝojn en ĝia strukturo dum la neimageble longaj geologiaj epokoj, kiuj signas ĝian pasintecon. Tiom longe kiom ekzistas racia estaĵo, de la homo, ĝi iel volis sciiĝi kiel estiĝis la vivo, kiel ĝi evoluis, kiuj estas la naturaj laŭleĝecoj de ĉi tiu evoluo kaj, ne malplej grave, ĝi avidis al la solvo de la demando, kiam kaj kiel ĝi mem, la homo, aperis.

Multaj homoj trovas fascinaj la pensojn pri la multspecaj ofte bizaraj estaĵoj, kiuj iam, antaŭ eonoj, evoluis en la pramaro, el kiuj poste difinitaj specioj konkeris la firman teron kaj inter kiuj, ree poste, kelkaj eĉ kapablis flugi, kvankam ne estante birdoj. Antaŭ ĉirkaŭ 12 miliardoj da jaroj formiĝis nia planeda sistemo kaj kun ĝi nia terglobo. Ĉi-rilate ni parolas pri Astra Epoko.

Depost ĉ. 4 1/2 miliardoj da jaroj nia globo havas firman kruston.

Por scienc klare difini la unuopajn stadiojn kaj periodojn en la evoluo de l'vivo, la paleontologia kaj geologia sciencoj interdividas tiun neimageble longan tempodaŭron en certajn epokojn : de la Astra Epoko ĝis en nia erao, la Kvaternaro, aŭ eĉ pli precize, la Holoceno t.e. la estanteco.

Kiom longe daŭris ĝis la nuntempo ? Kun kiuj intervaloj ?

Por doni imagon, jen komparo.

Ni imagu, ke la tuta evoluo dum 4 1/2 miliardoj da jaroj kvazaŭ okazu dum 24 horoj. Alivorte, ni egaligu, mense, ĉi tiun neimageble longan tempon kun la tempo-daŭro de 1 tagnokto. Do, la evoluo komenciĝu je noktmezo. Kio okazis dum la unuaj 6 horoj, do ĝis la sesa matene, tion eĉ la ekspertoj ne scias precize. Je la 8 h. 30 estiĝis la unua albumino kaj per tio « vivo ». Sed je la 17-a horo estiĝis la unuaj substancoj. Ĝis tiu posttagmeza horo okazis malrapidega progreso, ŝajne preskaŭ nenio. Du horojn poste, je la 19-a horo, la unuaj kappieduloj estiĝas. Vespere je la 20 h. 30 aperas la unuaj fiŝoj. Je la 22 h. 30 venas la prabirdoj kaj la dinosaŭroj, kiuj restadis dum 135 milionoj da jaroj. Je la 23-a horo estiĝis la unuaj mamuloj. Unu minuton antaŭ noktmezo komenciĝis la unua glaciepoko, kaj depost la lastaj 43 sekundoj de ĉi tiu lasta minuto ni povas paroli pri estaĵo, pli kaj pli, al kiu ni atribuas la nomon « homo ».

La bazo por nia konversacio estas la ekkonteorio de Darwin pri la evolucio, t.e. la evoluado de ĉiuj kreaĵoj, t.e. plantoj kaj bestoj, kaj do ankaŭ pri la homo. La ekkonoj de Darwin estas akceptitaj plej vastskale fare de la modernaj sciencoj. « Darwin » cetere tute ne devas esti kontraŭdiro aŭ antagonismo kontraŭ la religio — tute male. La scienco kompletigas la oftajn alegoriajn priskribojn de la religio. Laŭ tio do estas la **natura selektado** la plej grava faktoro por la evoluo de la specioj, t.e. natura procezo, el kiu rezultiĝas, ke transvivas tiuj formoj de plantoj kaj bestoj, kiuj pleje estas adaptitaj al la kondiĉoj sub kiuj ili vivas, dum malbone adaptitaj formoj ekstermiĝas, formortas. Unu el la sciencoj, kiu grave kontribuas al la solvo de tiuj enigmoj, estas la paleontologio. La paleontologoj serĉas la fontojn de siaj studadoj en la naturo mem. Iliaj instruiloj estas praaĝaj rokoj, subtera mallumo, deklivoj kaj fosaĵoj, ŝtonminejoj kaj fluejoj. De tie ili pene serĉas kaj kolektas unu ŝtoniĝon aŭ fosilion post la alia, por zorgeme ĝin analizi. Ĉiu tia trovitaĵo el ŝtona tombo, ĉiu fosilio, estas eta mozaikero por rekonstrui la prahistorion pri la vivo de nia mondo.

Ĉi-maniere la paleontologoj el ĉiuj landoj kaj naciecoj kunlaboras jam pli longe ol 150 jarojn. La paleontologio pruvas, ke multajn centmilionojn da jaroj antaŭ la komenciĝo de la homa historio komenciĝis la historio de la plantoj kaj bestoj sur nia planedo. Kaj la paleontologio ankaŭ montras, kiel estiĝis la nuntempa faŭno kaj kiel aspektis ĝiaj praaj antaŭuloj. La fosiliaj organismoj estas la parencaj antaŭuloj de tiuj, kiuj vivas nuntempe.

La tuta scio de tio ne estas nura faka scio, ĝenerale ne-interesa. Ĝi estas, tute male, biologia kleriga posedaĵo, pri kiu ni konsciu, por ke ni pli bone konatiĝu **kun ni mem** kiel parton de tiu organika mondo. Antaŭ ĉ. 2 miliardoj da jaroj formiĝis firma terkrusto (litosfero) sur nia planedo, dank'al favora distanco de la suno je 150 milionoj da km kaj meznombra temperaturo de ĉ. O° C.

Prapluvado. Vaporo fariĝas prujno.

La terkrusto ne havas la nuntempan formon. Ne estas vento, nek riveroj, nek maroj, sed intensiva vulkanismo. Lafofluoj vaste etendiĝas. Ŝtonaĵoj estiĝas kaj malaperas. Unu miliardon da jaroj poste, do antaŭ ĉ. 3 1/2 miliardoj da jaroj aperas la unua vivo en la maro. Do, dum tiuj 4 1/2 miliardoj da jaroj, **vivo,** eĉ en la plej primitiva formo estiĝis nur dum la lastaj ĉ. 500 milionoj da jaroj, en la Prakambrio. Formiĝis t.n. eobiontaj, burĝonkapablaj globetoj el albumino, bakterioj, blualgoj. Tiu unua « vivo » estis sekvo de kemia procezo de fotosintezo, t.e. disvolviĝo de « vivo » sekve de la energio de la suna lumo. Per tiu procezo estiĝis el neorganikaj kombinaĵoj organika substanco. Ĝis en la epoko de l'Kambrio, do dum la sekvintaj 3 miliardoj da jaroj estiĝas plantaj kaj animalaj unuĉeluloj, la t.n. protozooj. Daŭras vulkanaj erupcioj, la fundon de l'maro kovras rigidiĝintaj lafaj formacioj, kiuj estas bonaj insertaĵoj por primitivaj plantoj.

Nur iom post iom, en la prakambria epoko estiĝis plantaj kaj animalaj unuĉeluloj aŭ protozooj. Plej konataj inter ili estas la flageluloj, grupo inter plantoj kaj animaloj. Daŭris eĉ multe pli longe ĝis kiam formiĝis veraj kolonioj da protozooj kaj daŭris pluraj jarmilionoj ĝis kiam formiĝis ĉelunuiĝoj specialaj.

Nova evento je l'fino de l'epoko **Devonio** estas evoluiĝo de nesalakvaj **fiŝoj,** la granda specio coccosteus. Ĝi estas kirasa fiŝo kun akraj dentoj, kies fosiliojn oni trovis kaj en Eŭropo kaj en Usono. Evoluis aliaj specioj, i.a. tiuj kun stilz-formaj naĝiloj. Speciale menciindas, ke tiuj kirasaj fiŝoj estis la **unuaj bestoj kun spino.** Estis specioj inter ili, kiuj riskis leviĝi el super akva surfaco, fiŝoj kun bronkoj **kaj** primitivaj pulmoj. Por rampi servis 4 naĝiloj. Tio okazis antaŭ ĉ. 400 milionoj da jaroj. Tiel do estiĝis la unuaj specioj de **amfibioj.** Surtere ili jam trovis alian organan vivon, kaj vegetalan kaj animalan : la unuaj plantoj estis enradikiĝintaj. Sekvis insektoj inter ili araneoj. Do estis sufiĉe da nutraĵo por adaptiĝi al **nova** vivmaniero : al tiu **ekster** la akvo.

Por la fruaj specioj inter la reptilioj komence ne ekzistis « limoj de l'evoluado ».


La pli alte specialiĝintaj **reptiliaj specioj** konkeris kontinue **novajn vivospacojn,** alie dirite pli kaj pli taŭgajn vivo-eblecojn. Dume, kontinue, speciale la **cerbo** evoluis al fleksebla komanda centro de l'organismo, kio estas grava fakto por la evoluo de pluraj estontaj multvariaj specioj, survoje al la mamuloj.

Intertempe ni venis en la epokon de l'suba **Permio,** antaŭ 285 milionoj da jaroj. Estis tropikaj temperaturoj, dezertaj cirkonstancoj, vastetenda elsekiĝo de l'terglobo. Kiam dum tiu **epoko Permio,** antaŭ ĉ. 230 milionoj da jaroj, la duono de ĉiuj **enmaraj** plantoj kaj animalaj specioj estis formortintaj, la **reptilioj delonge dominis** super la amfibioj. Komenciĝis la **epoko de la reptilioj.** Kelkaj specioj inter la reptilioj readaptiĝis plene al vivo enakva, kie ili, dum jarmilionoj, formortis, kiel ekzemple la krokodil-similaj **Mesosaŭroj.** Ĝi estis la plej antikva en-akva reptilio.

En la sekvonta epoko **juraso** la klimato estis multe pli humida, marĉa kaj pli varma, kontraste al la pasinta Triaso. Estas ĉ. 195 milionoj da jaroj antaŭ la nuntempo.

Daŭrigota


Hugo Röllinger.



Laŭ la epokoj de nia Terglobo.

PAĜO DE LA GEKNABOJ

KANTU, MI PETAS, BIRDETO





Kantu,, mi petas, birdeto,
en via flavbrusta ĵaketo.


Kantu kun vervo — mute vi sidas!
Kiam vi migras, kion vi vidas?
Multon vi scias — tempo rapidas!

Kantu, mi petas, birdeto.

Kantu, mi petas, ĝojplene
dum brilas la suno serene!

Kantu pri maroj, ŝipoj, ŝipanoj —
Reĝo Neptuno kaj uraganoj —

pacaj insuloj — flamaj vulkanoj!
Kantu, birdeto, ĝojplene.







Kantu, mi petas, amiko —
mi vidas vin sur la saliko!

Kantu pri montoj neĝokovritaj —
lagoj — lagunoj — lokoj ekscitaj —

fruktoj kaj beroj bonapetitaj!
Kantu, mi petas, amiko.





Kantu, mi petas, plenkore —
kaj ĉion rakontu fervore!

Kantu laŭtvoĉe dolĉajn ĝojkantojn —
ĉion menciu — birdojn kaj plantojn —
densajn ĝangalojn — kaj elefantojn!

Kantu, mi petas, plenkore.



Kantu, mi petas, birdeto —
vi dronas en reva kvieto!

Kantu pri landoj fine de l'tero,
kie ridetas bela vetero —
ĉiam dormema glora somero!

Kantu, mi petas, birdeto.

Bertram Potts — Nov-Zelando

FANTAZIAĴO : Enamiĝinta

Tio okazis antaŭ la milito. En la unua klaso de la realgimnazio, ni lernis la germanan, en la tria la latinan kaj en la kvina la francan lingvojn, do ĉi lastan dum kvar jaroj. Ĝis la kvina klaso, niaj kapoj estis jam plenaj de vortoj, esprimoj, gramatiko. La francan lingvon instruis juna profesoro, kiu enkondukis novan instru-metodon. Dum la leciono, la tuta klaso devis atenti, ĉar oni neniam sciis al kiu li direktos la sekvan demandon el la legaĵo. Ne la tradukado de la legaĵo estis grava, ja tion oni povis ellerni parkere, t.e. la hungaran tekston, sed li volis nepre evoluigi nian parolkapablon kaj ke ni povu uzi la vortojn lernitajn. Okazis, ke ankaŭ la sekva demando trafis la ĵus respondinton, do oni ne povis trankvile atendi la finon de la leciono pensante, ke oni jam aĉetis sian ripozon per unu bona aŭ malbona respondo. Same okazis la pridemandado de la vortoj. Li demandis de unu lernanto nur kelkajn vortojn, poste sekvis la alia viktimo.

— Julio Körmendy/Keurmèndi, laŭ franca prononco/Li stariĝis.

— Enamiĝinta — diris serioze la profesoro la vorton, kiu troviĝis en la legaĵo.

— Mi ne estas, sinjoro profesoro.

Tutklasa ridego, sed samtempe ni timis, ke la profesoro ekkoleros.

— Silence !/Silento/ — diris la profesoro. —Mi tre ĝojas, ke vi komunikis tion al mi kaj al la tuta klaso, sed nun bonvolu diri la frazon france.

— Ne nur la vorton, sinjoro profesoro ?

— Ne. Tion, kion vi respondis.

— Je suis .../Mi estas/

— Sed vi ĵus diris, ke vi ne estas enamiĝinta.

— Je suis non...

— Tiel diras vi, sed ne la Francoj.
Intertempe la perflustra sav-agado ekfunkciis.

— Je suis pas...

— Tio jam iome similas al la lingvo de Molière.

La perflustra helpo estis efika kaj li memfide diris :

— Je ne suis pas/Mi ne estas/

— Enamiĝinta. Kion ĝi signifas ? — demandis la profesoro.
Tomba silento.

— Kiu helpas al li ? — demandis la juna profesoro, kiu aliokaze tuj diris « sidiĝu », se iu ne sciis du vortojn. Tridek manoj leviĝis en la aeron, eĉ tiuj sin prezentis, kiuj ne sciis la vorton, sed pensis, « ĉu ĝuste mi estos tiu, kiun li demandos ?

— Nu, diru al li.

Kaj la tuta klaso ĥore laŭte diris :

— Amoureux, amoureuse !/ Enamiĝinta/

— Kaj Körmendy, nun ni aŭdu la tutan frazon.

Profunda ĝemspiro. Okuloj al la plafono direktitaj. Ankaŭ la profesoro alrigardas la plafonon.

— Ĉu ĝi estas tie skribita per nevideblaj literoj, kiujn nur vi vidas ? — li demandis.

— Ne, sinjoro profesoro, mi nur koncentras miajn pensojn.

— Nur ne tre longe, ĉar baldaŭ finiĝos la leciono kaj ni eĉ nun okupiĝas pri via enamiĝo.

— Non...

— Très bien !/Tre bone/ Jen la rezulto de la spirita koncentriĝo.

— Non...

— Tion ni jam aŭdis.

— Non, je, je ne... suis... pas../Ne, mi, mi, ne estas/

Denove silento. Amoureux — flustris la tuta klaso kaj nun eĉ la juna, simpatia profesoro ekridetis.

— ... suis pas amoureux — finis la frazon Körmendy.

Granda malleviĝo. Sincerdire ni estis enpense dankemaj al li, ĉar forpasis pli ol dek minutoj pro Körmendy, dum kiuj ni ne devis streĉatendi kaj respondi.

— Kiun lingvon vi amas pleje ? Ĉu la germanan latinan aŭ la francan ?

— La francan, sinjoro profesoro.
Sufokita tutklasa rido.

— Kaj kion vi dirus al sinjoro klasestro, kiu instruas latinon ?

— De nun mi ĉiam diros : la francan.

— Kaj kial ?

— Ĉar ĝi estas bela, havas nur du genrojn, masculin kaj féminin./Ĉi tiujn du vortojn ni aŭdis ĉiulecione centfoje, tial ni sciis./

— Dankon Körmendy kaj dank'al Dio, ke vi ĝin amas. Sidiĝu.
Ĉi momente eksonis la paŭzon signalanta sonorilo.

Sekvatage la lasta leciono estis latino, kiun instruis la klasestro. Ni tradukis poemon de iu aŭtoro. La leciono jam estis finiĝonta kaj ni esperis, ke li diros la hejman taskon, kiam li ekvoĉis :

— Körmendy.

Li stariĝis.

— Daŭrigu.

Ĝuste tiam troviĝis en iu frazo/eblas, ke la profesoro ĝuste pro tio respondigis lin/ la konjugaciita formo de la verbo amare : amavit. amabit aŭ amatus sum, mi ne scias, kiu.

— Kio estas la baza vorto ?

— Amo amare, unua konjugacio.

— Konjugaciu ĝin en prezenco.

— Amo, amas, amat...

— Kiel vi tradukas : mi ne estas enamiĝinta ?

Tutklasa retenita rido.

— Ego sum... ne, ne... ego non sum../Mi ne estas/, sinjoro profesoro en latino ĉi tiu vorto enamiĝinta ne ekzistas.

— Kial ?

— Ĉar la Romianoj ĉiam batalis, militis, konkeradis kaj...

La retenita rido eksplodis.

— Kiel vi diras france ? — demandis la klasestro.

— Am... amou... amoureux.

— Nu, la du lingvoj estas parencaj. La franca devenas el la latino, do...

— Amurus, amura amurum.

— Eble en iu dialekto. Ĉu vi forgesis la proverbon : Omnia vincit...

— Amor !/Ĉion venkas amo/ Amorus, amora, amorum.

Ankaŭ la klasestro ridis.

— Hejme konsultu la vortaron kaj por la frazo — li diris ridete.

Ĉi minute eksonis la sonorilo, kiu signalis la finon de la lerneja tago.

Mondmilito. Dum ok jaroj ni sciis nenion unu pri la alia. Post la milito ni aranĝis la unuan « abiturientan renkontiĝon » en la urbo de la realgimnazio — ankaŭ la edzinoj partoprenis ĝin — kaj de tiam en ĉiu kvina jaro. Ĉiu sidis en sia iama benko. Nu, ne tiel komforte, ĉar la benkoj intertempe estus kvazaŭ iome mallarĝiĝintaj. Sufiĉe multaj sidlokoj restis neokupitaj. Kelkaj mortis en la milito, aliaj restis eksterlande. Ĉiu ĉeestanto rakontis koncize sian vivon post la abiturienta diplomo. Pri la forestantoj tiuj diris ion, kiuj sciis aŭ aŭdis ion pri ili. « Li mortis en Rusujo... li estis judo, laŭdire li troviĝas en Ameriko... Li mortis dum bombardoj... li vivas jen lia letero, sed pro familiaj kaŭzoj ne povis veni... Körmendy... ».

— Miascie, li ne frekventis ian altlernejon aŭ universitaton, do li devis soldatiĝi, sed antaŭ la soldatservo li okupiĝis pri vinkulturo kaj laŭdire li troviĝas en Francujo ; iu renkontiĝis kun li, kiu rakontis tion al mia konato, kiu poste rakontis tion al mi, do ion certan ni ne scias pri li.

— Kaj ĉu li parolis jam france ? — ekvoĉis samtempe pluraj.

— Se li okupiĝis pri vinkulturo, li ĝuste elektis la landon, Francujon — diris lia iama amiko kun kiu li sidis en la sama benko.

— Kaj la kvarjara lernado de la franca certe estis utila al li — diris iu.

— Ankaŭ mi tre bone utiligis la latinon sur la fronto — ekvoĉis la plej malbona latinisto — ĉiu dua ruso latine parolis.

— Ĉu vi scias, kion mi ne forgesis el la franca ? Tiun poemeton, kiun lernigis al ni tiu civila profesoro, kiu dum duona jaro anstataŭis la junan profesoron, kaj li ekkantis :

Quand on perd par triste occurence
Son espérance et sa gaîté,
Le remède au mélancolique,
C'est la musique et la beauté.
Plus oblige et...

Granda aplaŭdo, rido... « Jen, lingva geniulo — diris Tibor. Ĉefrolu per ĝi en la operejo » — proponis iu alia kaj ni estis feliĉaj, ja ni vivis, ni estis ree kune kaj ni elvokis la pasintecon, kvazaŭ intertempe nenio estus okazinta. Ankaŭ nia klasestro ĉeestis.

— Petro, ĉu vi memoras, kian vangofrapon vi ricevis ? — li demandis.

— Grandan, sinjoro klasestro, ĉar mi restis en la klasĉambro dum la dekminuta paŭzo por rapide skribi, pli ĝuste kopii la latinan hejman taskon.

— Ree unu geniulo, kiu tiel bone memoras — ekvoĉis denove Tibor.

— Ankaŭ vi memorus, se vi estus ricevinta ĝin — respondis Petro.

Jene pasas la tempo. Demandoj, respondoj kaj esperoj.

Kaj Körmendy ? — venis al mi en la kapon. Se li troviĝas en Francujo kaj restos tie, certe li ellernos france kaj eble — kiu scias ? la franca estos post kelkaj jaroj lia dua gepatra lingvo.

Jam multaj jaroj fluis de la unua renkontiĝo. Li neniam sin prezentis, neniam skribis al iu, do kio okazis al li, ni ne scias. Povas esti, ke li fariĝis « amoureux » kaj nun vivas kun ŝi ie en la mondo aŭ ĝuste en Francujo.

Istvàn NAGY.

POR VIA DISTRO


SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO :

Trovotaj vortoj : kopio, Nilo, morto, perdo, ne, latva, eta, sen, dece, rido.

La verko reeldonita en 1980 estas :

Enciklopedio de Esperanto, eldonejo : Literatura Mondo.

KRUCVORT-ENIGMO



Horizontale :

1. — Verbo ignorata de la Esperantistoj...
2. — Kvalifikas diligentecon. — Tro malofte, bedaŭrinde, Esperanto estas ties temo (s.f.).
3. — Kiel sin prezentas ne malmultaj esp-aj poeziaĵoj... (figurasence).
4. — Ĝi estas pli forta ol morto, en titolo de latva tragedio esperantigita de Ĉaĉe en 1933. — Ĉe la manoj de laboristoj (s.f.).
5. — La rikolto estas tia kia tio estas (Proverbaro). — Laŭ ia maniero (emfaza formo).
6. — Virnomo, i.a. de pluraj papoj.
7. — Kvincent unu ĉe la malamikoj de Asteriks. — Doni elen.
8. — Ĵeti per ilo, celante vundi aŭ mortigi. — Simbolo de malofta metalo.
9. — La antaŭa parto de armeo, taĉmento. — Tempa adverbo.
10. — Judgermana ĵargono. — Tia scienco la poezio de la Trobadoroj.

Vertikale :

1. — Kiaj la malkontentigaj lernantoj en niaj kursoj.
2. — Malamegi. — Persona pronomo.
3. — Ĝi konsistigas la ĉefan nutraĵon de vegetalistoj. — Mallarĝa tervojeto (s.f.).
4. — Angla biero. — Ĝi povas konsisti el sablo aŭ verdaĵo.
5. — Plejofte ĝi iras rapidege ; kiam senmova ĝi indikas direkton. — Skandinava aerfeo.
6. — Meriti.
7. — Regulo de la eksteraj manieroj en mondumo. — Adverbo uzata por emfazi.
8. — Kiuj denove transiros de bona al malbona stato.
9. — Apartigite, senkontakte. — Estinta.

C. Cavalié.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

LIA — ŜIA — ĜIA — ILIA

RIM SIA akompanas la komplementon, neniam la subjekton.

LIA Petro promenas kun siaj gepatroj :
— Lia patro portas la piknikon
— Lia patrino tenas lian manon (de Petro).

ŜIA Sofia ludas kun sia hundo :
— ŝia robo estas blua.

ĜIA — ĝia vosto estas longa.

ILIA la infanoj ludas en la korto :
— iliaj krioj estas surdigaj.

RIM : En frazo, subordigita propozicio povas akompani ĉefan propozicion :
Ni vidas la birdojn, kiuj flugas.

Pri la uzo de la posesivo, oni devas tre atenti la verbon kaj la subjekton :
— la patro faris decidon, kiu mirigis lian edzinon.

Miskompreno.



— ŝia koro batas : ĉu li konfuziĝas pro mia beleco ?
— lia koro batas : kial ŝi estas tute nigre vestita ?
— Ho ! Sofia ! ĉu mia avo mortis ?
— Stultulo !

Esti de sia tempo.



Mi petas vin, sinjoro Direktoro, ĝiaj referencoj estas inter viaj manoj ; siaj indikoj estas kontentigaj ; ili diras : « lia tajpado estas rapida ; ŝia profesoro diras ŝin bona stenisto ». Sed neniam temis pri ortografio ; estas arkaika lernobjekto tute forlasita.

Hezito.



La vojaĝo Londono-Romo daŭras nur du horoj kaj duono ! Ne estas eble ! Mi ŝparis monon dum tri jarojn. Mi ne povas elspezi tiom da mono en tiom malmulte da tempo !

KOREKTOJ :

— sen eraro.
— miaj, iliaj, ŝia, stenistino.
— horojn, duonon, jarojn.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 5631 KK EINDHOVEN, ZH pĉk. 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 4 de 1984, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La réunion du Conseil d'administration du mois d'octobre a été consacrée en très grande partie à la mise au point du programme 1985. Un compte rendu de cette réunion vous est donné dans ce numéro. Mais quelques modifications dans le calendrier exigent peut-être des explications.

Le calendrier comporte les changements suivants : la rencontre du 15 au 30 juin, proposée très tard l'an dernier, est intégrée dans le programme. D'autre part, au lieu de quatre périodes en juillet et août, il n'y en aura en 1985 que trois, mais de trois semaines chacune. Pourquoi ? Parce que depuis déjà longtemps des amis nous font remarquer que deux semaines sont insuffisantes pour une étude sérieuse de la langue. Ainsi, chaque période de cours durera trois semaines. A la première il y aura, comme d'habitude, des conférences. La troisième sera un peu plus chargée ; pendant trois semaines on pourra suivre les activités communes : cours, conversations, excursions, distractions. Ceux qui s'intéressent à l'informatique liée à l'espéranto pourront, pendant les deux premières semaines suivre des cours spéciaux ; les non-voyants sont invités par F.U.B.E. à venir pendant les deux dernières semaines. Les uns et les autres pourront profiter des activités communes et apporter leur part. En particulier, les non-voyants feront profiter tout le monde d'un programme culturel très intéressant.

Autre point qui a été très discuté, celui des tarifs pour 1985. Nous avions toujours mis un point d'honneur à proposer des prix de séjour permettant au plus grand nombre d'accéder à l'espéranto ou de le pratiquer en milieu international. A tel point que ces prix étaient très inférieurs à ceux pratiqués dans des centres similaires parfois cependant subventionnés. En outre, la part de l'entretien dans les dépenses est de plus en plus grande. L'augmentation annuelle des tarifs se basait plus ou moins sur le taux d'inflation. Plus ou moins, car si l'an dernier le taux d'augmentation des séjours a dépassé un peu celui de l'inflation, cela ne compensait pas la politique inverse pratiquée à l'époque où le taux d'inflation augmentait régulièrement ; en 1980, nos tarifs ont crû de 9,8 % alors que l'inflation avait connu une hausse de 14 %. Le freinage de l'inflation aurait dû nous permettre de rattraper notre retard. Mais les articles pris en compte pour le calcul du taux d'inflation ne représentent pas la plus grosse part de nos dépenses « hébergement ». En général, le chapitre « alimentation et chauffage » n'atteint pas la moitié du chapitre « salaires, charges, impôts ». Or, le S.M.I.C., les charges sociales et les impôts ont augmenté globalement de 135 % entre 1978 et 1983, tandis que nos tarifs n'augmentaient que de 103 %. Pour 1985, pour éviter des difficultés financières qui pourraient se dresser devant nous dans quelques années, le Conseil d'administration a décidé une augmentation des tarifs plus forte que d'habitude. Elle ne nous permettra peut-être pas de rattraper notre retard, mais elle laisse subsister la compétitivité de nos prix.

A la base de notre décision, il y a aussi un pari : nous pensons que vous croyez suffisamment en l'Espéranto et tenez assez à Grésillon pour accepter ce sacrifice. Ce pari sera-t-il gagné ? Vous seuls pouvez répondre.

P. BABIN.

INTER NI

La kalendaro de niaj venontjaraj aranĝoj (vidu la programon) iom malsimilas la pasintsomeran. La renkonto de junio enŝoviĝas en la oficialan programon. En julio kaj aŭgusto okazos tri trisemajnaj periodoj, ĉar multaj amikoj rimarkigis al ni, ke du semajnoj ne sufiĉas por serioza studado de la lingvo. La lasta somera periodo estos iom ŝarĝita. Dum tri semajnoj okazos komunaj aktivaĵoj : kursoj, konversacioj, ekskursoj distraĵoj. Tiuj, kiuj interesiĝas pri « Informatiko per Esperanto » ĉeestos specialajn kursojn dum la unuaj du semajnoj. La nevidantoj vizitos Gresillon dum la lastaj du semajnoj kaj ankaŭ ili povos partopreni la komunajn aranĝojn. Ili alportos al ĉiuj sian propran kulturan programon, kiu estas altnivela.

Ni decidis altigi la restadprezojn iom pli ol kutime. Ĝis 1980 la inflacio regule kreskis sed niaj tarifoj ne samgrade altiĝis : en 1980 la kresko de niaj tarifoj estis 9,80 %, tiu de la inflacio 14 %. De tiu tempo la inflacio malaltiĝis sed ni ne povis retrovi ekvilibron inter la kresko de la elspezoj kaj tiu de la enspezoj pro tio, ke la artikloj sur kies prezo baziĝas la kalkulo de la inflacio ne reprezentas la plej grandan parton de niaj elspezoj. La ĉapitro « nutraĵoj » ne atingas eĉ la duonon de la ĉapitro « salajroj kaj impostoj ». Ĉar ek de 1981 la plej malaltaj salajroj multe kreskis, nia ĝenerala elspezĉapitro pli kreskis ol la inflacio. Inter 1978 kaj 1983 niaj tarifoj altiĝis je 103 %, la salajroj kaj impostoj je 135 %. Pro tio ni decidis tiun iom fortan altigon de niaj tarifoj. Ili tamen restas relative malaltaj.

Ni esperas, ke ĉiuj amikoj komprenos nian decidon. Ni vetis, ke vi sufiĉe alte taksas Esperanton kaj Gresillon por daŭre viziti nin. Nur vi povas helpi nin gajni tiun veton.

***

APPEL

Un certain nombre de nos amis n'ont pas renouvelé leur abonnement pour 1984. Quelques-uns ont même oublié de régler 1983. Un rappel est porté sur la bande de la revue pour les retardataires. Merci de penser que **Kulturaj Kajeroj** ne vit pas de l'air du temps. Un déficit de la revue c'est une perte d'argent pour la Maison Culturelle.

Réglez en même temps 1985, et abonnez vos amis, **directement au compte Nantes 281361** ou par chèque Bancaire.

***

NOS PEINES

Nous apprenons le décès le 26-11-84 de **Gretel Schütt,** l'épouse de Hans Schütt, de Hambourg, ami de Grésillon et fidèle stagiaire depuis longtemps. Que Hans et sa famille trouvent ici le témoinage de notre profonde sympathie.

RÉUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 21 OCTOBRE 1984

Le Conseil d'administration s'est réuni à Grésillon le 21 octobre 1984, à 10 heures.

Etaient présents : Mmes Cheverry, Lenel, Micard, Vincent, MM. D. Babin, P Babin, Bénistant, H. Boyet, Bodereau, Guillot, Métivier.

S'étaient excusés : Mme Prévot, MM. F. Boyet, Chevalier, Dairon.

CARACTERISTIQUES GENERALES DE LA SAISON 1984

Le nombre total de personnes ayant séjourné à la M.C.E. en 1984 est de 284, en légère baisse par rapport aux années précédentes (330 en 1982 et 307 en 1983).

L'âge moyen des participants est plus élevé que d'habitude (46 ans) et on constate que très peu de ces participants ont entre 20 et 30 ans. Cette désaffection des 20-30 ans est peut-être due à des problèmes financiers à cette période de la vie des familles.

APERÇU FINANCIER DE LA SAISON 1984

La diminution de la fréquentation de la M.C.E. se traduit par des « rentrées séjours » très moyennes. Cependant, les dépenses d'alimentation sont stables par rapport à 1983, alors que les salaires sont en augmentation. Cette augmentation est due au fait que la plupart des personnes employées sont payées au S.M.I.C. et que celui-ci augmente plus vite que l'inflation générale.

Les dépenses d'entretien de la propriété ont augmenté plus que d'habitude en raison des dépenses de réparation de l'étang, qui s'est vidé au cours de l'été, et du remplacement des revêtements des murs du couloir imposé par les services de sécurité.

SEJOURS 1984

Un séjour en juin a été organisé en avril seulement et a été peu fréquenté, mais très vivant. Il regroupait surtout des personnes du « troisième âge ».

La *PREMIERE PERIODE* comportait des conférences et des cours, guidés par J. Turbillon, E. Ludwig et D. Moirand. Le séminaire organisé par Mme Childs-Mee a été satisfaisant.

La *DEUXIEME PERIODF* a été consacrée à des cours dirigés par Mme Childs-Mee pour le premier degré, par Mme Farkas pour le deuxième degré et par Mme Vincent pour le troisième degré. Elle a connu le succès habituel.

La *TROISIEME PERIODF* était axée en priorité sur des activités manuelles. Elle n'a pas donné entière satisfaction en raison du fait que les activités manuelles qui devaient être l'occasion de pratiquer la langue internationale se sont trop souvent déroulées en français. Cette formule ne sera pas reconduite. M. F. Boyet a connu quelques difficultés pour conduire son cours d'espéranto.

La *QUATRIEME PERIODE,* organisée par F.U.B.E., a connu une faible participation, mais s'est déroulée de façon satisfaisante.

La saison s'est terminée par un passage P.T.T. de 55 personnes du 27 au 30 septembre.

CALENDRIER POUR 1985

PREMIERE PERIODE, du 31 mars au 6 avril : « Internacia Renkonto de Infanoj », sous la responsabilité de M. et Mme P. Babin. Au cours de cette période, un stage de professeurs souhaitant réaliser un Projet d'action éducative d'espéranto sera organisé.

DEUXIEME PERIODE, du 15 juin au 30 juin : « Internacia Renkonto », sans programme formel, sous la responsabilité de M. et Mme P. Babin.

TROISIEME PERIODE, du 30 juin au 21 juillet : « Prelegoj kaj kursoj », sous la responsabilité de M. et Mme Durwael.

QUATRIEME PERIODE, du 22 juillet au 11 août : « Cours », sous la responsabilité de Mme Lenel et Mme Leriche.

CINQUIEME PERIODE, du 11 août au 1er septembre : « Cours », sous la responsabilité de Pascale Babin, M. et Mme D. Babin. Pendant les deux premières semaines, un stage ayant pour titre « Informatique et Espéranto » sera proposé et organisé par D. Babin et H. Boyet. Du 18 août au 1er septembre, stage organisé par F.U.B.E.

Des renseignements ont été demandés par une école d'Angers pour organiser des « Classes vertes » au château.

TARIFS

Le montant des droits d'inscription est fixé à 120 francs pour deux ou trois semaines et à 60 francs pour une semaine.

Les tarifs de pension journalière sont :

	7 jours ou plus	moins de 7 jours
Chambre particulière	130 F.	150 F.
Chambre familiale	115 F.	130 F.
Chambre commune	100 F.	115 F.
Camping	90 F.	105 F.
Enfants (jusqu'à 6 ans)	60 F.	70 F.

Le prix d'un repas pris au château par une personne de passage est fixé à 45 F. (boisson non comprise).

Les personnes ayant accepté de diriger des cours pendant la saison 1985 sont : Mme Vincent (période de Pâques), Mmes Childs-Mee, Farkas, Mlle Turbillon, MM F. Boyet, Lloancy, Moirand.

QUESTIONS DIVERSES

— Des réponses assez nombreuses ont été obtenues à l'appel pour retrouver l'adresse de certains sociétaires.

— Le manuel de M. Ribot « Préparation au Kapableco » sera revu et réédité par la M.C.E.

— La revue « Kulturaj Kajeroj » sera, à titre d'essai, éditée à Nantes avec les moyens propres à la M.C.E. ; l'imprimeur qui assurait jusqu'ici cette édition ne fournirait que la couverture (un devis a été demandé).

— Mme Childs-Mee suggère de réaliser une flore et une faune de la propriété en espéranto. Idée à suivre.

— Des contacts ont été pris avec M. Auld pour animer un séminaire de haut niveau à Grésillon pendant la saison 1986.

— L'ensemble des devis pour la réfection de l'escalier s'élève à environ 25.000 F.

Le secrétaire de séance,
JEAN-PAUL GUILLOT

GRAND SUCCES

de la quatrième édition de

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

—

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel aux groupes et aux Libro-Servoj.

—

Commandes à : J. Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

VOUS NE POUVEZ PAS

suivre un cours oral dans votre ville ?

Pourquoi ne pas essayer nos

COURS PAR CORRESPONDANCE

POUR LES DEBUTANTS : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices. Permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

COURS DE PRATIQUE : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **120 F.**

NIVEAU SUPERIEUR : versions, thèmes, études de textes ; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **90 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

***

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé — C.C.P. Nantes 1485-39 P.

LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque.. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.